


Vol. 17.



JEN



Julio (2) 1962 (2)

N-RO 1 BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA NORD-AMERIKA

Dum multaj monatoj ni vidas bezonon de junulara fako en la Usona esperantismo, kiu farus nian nacimovadon pli simila al la Eŭropaj. Cni ne povas ĉeesti Nov-Jorkajn klasojn kaj kunvenojn sen vidi la multajn junajn interesulin; tio konvinkis nin, ke daŭra neesto de junulara fako estos por la Usona movado ĝenerale vunda makulo. Ni bezonas organizaĵon, kies membraro povas uzi efektive la lingvon kaj povas labori por la movado en neformaligita, sociala atmosfero; alivorte, en juneca atmosfero.

Nur unu regulon ni konstatas por niaj "kunvenoj": **NE UZU LA ANGLAN LINGVON!** Ni decidis ankaŭ uzi nur Esperanton en nia bulteno, kies unua numero vi nun legas. Estontaj numeroj aperos pli-malpli monato, senpage por la membraro, kaj preze de 50¢ poŝtmarkvaloro por aliaj. Nia adreso: 30 Ave B, NYC 9, NY, Usono.

ESPERANTO-KLASCJ EN NOV-JORKO

Nov-Jorko -- plej oportuniĉa urbo de nia lando por studemuloj -- havas mil avantaĝojn ankaŭ por la lingvistudento. Vere estas dirata: en Nov-Jorko troviĝas pecoj de ĉiuj mondkulturoj. Neeviteble do -- kaj bone -- ke Nov-Jorko ankaŭ ne mankas Esperantistojn. Ĝi eĉ ne mankas Esperanto-instruistojn! Nur unu manko estas videbla en nia metropola Esperantismo: progreso. Progreso de la unuopa studento de fiksita kanenco ĝis fiksita fino. Tio verŝajne malamas la Usonanoj formalecon, ke kiam nova interesulo deziras eniri en klason, en kiu la aliaj lernantoj jam estas iom progresintaj, oni ne devigas lin atendi ĝis komenco de sekvanta klaso, sed sidigas lin meze de la plispertuloj kaj efektive ripetas la lastan lecionon. Post kelkaj refoj de tia enuiga nelogikaĵo, seriozaj interesuloj tendencas malaperi de la sceno. Sed kio estas la alternativo? Ni ne havas skale organizitajn klasojn. Kaj multaj plenkreskuloj preferas studi en grupo, eĉ se ili havas kapablon studi sole. Studado estas deviga, ĉar oni ne povas "absorbi" Esperanton kiel nacian lingvon -- oni ne povas profiti de indiĝena parolantaro, almenaŭ ne en Usono.

En Nov-Jorko, kiel en la cetera mondo, ni Esperantistoj povas antaŭvidi relative grandan kreskon de intereso pri nia lingvo. Eble pli da formaleco ĉe klasorganizado ne estus malsaĝa.

Alia solvenda problemo: efektiva dispartigo de la gekomencantoj. Granda diferenco ekzistas inter tiuj, kiuj jam studis fremdlingvojn (al kiuj oni kredeble povus instrui Esperanton sole per Esperanto) kaj tiuj, kiuj konas sian vojon nur Angle. Ambaŭ grupoj havas apartajn avantaĝojn en la lernado de Esperanto; kial ne utiligi ilin?

Romo ne konstruiĝis en unu tago. Sed iu Romano devis fari la unuan paŝon por organizi la kunlaborantojn! Ni faru same kun niaj instruistoj, kaj nia aro multobliĝos kiel ameboj.

POR INFORMAĴOJ PRI LA 'JEN' (JUNULARO ESPERANTISTA NORD-AMERIKA) SKRIBU
AL RICHARD KOLLIN 30 Ave B, NYC 9, NY . KAJ POR LA BULTENO, KONTRIBUAĴOJ
ESTAS BONVENAJ _ VERKOJ, ARTIKOLOJ, POEMOJ, SUGESTOJ, ŜERCOJ, KONDAMNAJ
LETEROJ _ IO AJN. SENDU AL KENNETH MINER --SAMA ADRESO.

ALIĜU AL JEN
ALIĜU AL ELNA
ALIĜU AL UEA

DU POEMOJ EL MEKSIKO

Oni rimarkos stilan diferencon inter la jenaj poemoj kaj aliaj, pli ĝenerale vidataj en la Esp-a gazetaro. Tiun diferencon ni povus nomi, almenaŭ supraĵe, NUNTEMPECO. La poezio kompreneble ne estas moda afero; ideale ĝi estas pretertempa (privata opinio), tamen ne estas kontraŭdireble, ke la plimulto el la popularaj Esp-aj poetoj ne estas junaj, kaj plibone spegulas pasintan epokon ol la hodiaŭan. Same pri tradukistoj kaj aliaj elektaĵoj. Estus trege refreŝe, vidi pli da originala verkado de junaj Esp-aj poetoj, kaj iom da "juna sango" en la tradukaĵoj.

Karakterizas la modernajn artformojn esplorado, eksperimentado, serĉado - serĉado, ne nur por "la vero" sed ankaŭ por veraj avenuoj, kiuj kondukos al vero, aŭ eble al nenio alia ol estonta ebleco de iu vero. La celo de la poeto ne plu estas universala, fiksita. Sed por la individua poeto, malgraŭ tio, ĝi povas esti tre klara. En ĉi tiuj verketoj du junaj Meksikanoj, kun tre delikata tuŝo, pritraktas sentojn senesperecan kaj ironian. La traduko estas laŭvorta; la originaloj ne havas regulan metrikon.

TUJA PROFETAĴO (de Juan Bañuelos)

Mi forlasas ĉi tiun paĝon.
Ne plu taŭgas papero.
Ne taŭgas plorado.

Mi ĵus donis duoblan frapegon
al la tablo de malsato kaj de monpruntado.
Mi ĵus ŝurligis la timon al la raketo ĉevalsimila,
kolektis falantajn neĝerojn
faris el mia animo sekan haŭton.
Mi ĵus desegnis bildon de pafbulero en mia frunto
deprenis al la strato la luton kaj febron.

Ne plu taŭgas papero.
Ne taŭgas plorado.
Mi skribas sur la murojn.

DIO (de Sergio Mondragón)

ni ne kulpiĝas
diris la poeto
ni havas
niajn senkulpiĝojn

mi ne konsilas
mi ne diras:
estas la tempo
kiu kuras

agonio vin komencas premi
ĉu ne, frato
jen
jam superflua
ironio

majo 1961
sed mi skribis ĝin septembre
kien ni iras:
Katanga Lumumba Londono
vi mi li kaj ĉiuj
kunlaboras

mi deziras mi devas
jes ne
mencii Dion
sonas tiel softe
ĉar li ne nomiĝas
Dio

kaj mi suferas

(Tradukoj de la redaktoro)
